# Gajnintoj de la konkurso Instruistoj de la jaro 2024

## 1- Gajnintoj de la Juna Instruisto de la Jaro 2024

- Paweł Fischer-Kotowski (Juna Instruisto de la jaro 2024)
- Joel Muhire (Honora Atestilo)
- Ranja Zafinifotsy (Honora Atestilo)
- Alexander/Alekso Vaughn Miller (Honora Atestilo)

## 2- Gajnintoj de la Instruisto de la Jaro 2024

- Fransoazo Noireau (Instruisto de la jaro 2024)
- Dennis Keefe (Honora Atestilo)
- Vida Kulikauskiene (Honora Atestilo)

***Biografioj de la Gajnintoj de la Instruistoj de la jaro 2024***

### Instruisto de la jaro:



**Françoise NOIREAU** estis profesia instruistino kaj psiĥopedagogo, kaj de kelkaj jaroj volontule instruas Esperanton kadre la universitato Espero en DR Kongo. En 2024-25 registriĝis pli ol 250 gelernantoj el 22 afrikaj landoj tra ŝia afrika distanca kursaro kun teamo de 16 help-instruistoj. Dum 35 jaroj ŝi instruis Esperanton en kvar regionoj de Francujo kaj diversaj lokoj de Esperantujo (Rusujo, Tajlando), uzante aktivajn metodojn kiel tabloludojn, skeĉojn kaj rolludojn. Ŝi pionire uzas modernajn teknologiojn por distanca instruado (kiel WhatsApp por Afriko), kaj kreis adaptitan kurson por tujmesaĝa instruado.

Antaŭe, ŝi gvidis klaskorespondadon, estis Duolingo-ambasadoro, lanĉis lingvofestivalon, kaj kunkreis instrumaterialojn (lernoludojn) kun Daniel Lacroze-Marty. Ŝia plej granda feliĉo estas tio, ke ŝiaj tri gefiloj daŭre agadas en Esperantujo, kaj ŝia nepo en Kebekio estas denaska esperantisto.

### *Honoraj atestiloj:*

**Dennis KEEFE** estas profesia lingvo-instruisto (MA TEFL, MBA), universitata programestro kaj instruisto pri merkatiko, kiu kreis la plej intensan Esperanto-kursaron nuntempe - Esperanto-Plaĝon en Hispanio, 61-tagan programon kun 8 horoj ĉiutage en aprilo kaj 4 horoj ĉiutage en majo,

atingante 650-862 ĉeestajn instruo-horojn plus pli ol 200 virtualajn horojn en 2024-2025. Li verkis abundajn instrumaterialojn inkluzive de la BEK-serio (kvar libroj pri Esperanta sintakso), ekzercaron por Don Kiĥoto (3024 ekzercoj), Praktika Bildvortaro (pli ol 2000 ekzercoj), kaj aliajn specialajn kursojn por ĉiuj KER-niveloj. Krom sia instruado, li kunlaboris kun NASK, Gresillon, ILEI, UEA, kreis Lingvajn Festivalojn, estis ĉefa eksterlanda Esperanto-instruisto en Ĉinio dum jardeko, kaj nun preparas novajn kursojn inkluzive de Robinson Crusoe-ekzercaro.

**Vida Kulikauskienė**, prezidantino de la Esperanto-klubo „Revo" en Panevеĵis (Litovio), konatiĝis kun Esperanto infanece, ekinstruis en 2013, unue al sia filino kaj klubanoj. Ŝi aliĝis al la projekto Ekparolu en 2017 kaj estas tre aktiva „onklino". Ekde tiam ŝi okazigis pli ol 400 parolsesiojn, ofte preparante lernantojn ankaŭ por la KER-ekzameno. En 2018 ŝi estis nomita „La plej diligenta onklino" de la jaro. Ŝi gvidis Zoom-kursojn por la Londona Esperanto-Klubo, inkluzive de kurso por B2-nivela ekzamena preparado. Dum virtualaj kaj ĉeestaj kongresoj ŝi kelkfoje gvidis diversnivelajn Esperanto-kursojn. Ekde 2022 ŝi instruas ankaŭ ĉe la Universitato de la Tria Aĝo en sia urbo. Ŝi uzas materialojn de edukado.net, lernu.net, la rektan metodon de Stano Marĉek, kaj kunlaboras kun instruistoj el diversaj landoj; krome ŝi mem kreas taskojn por plivigligi kaj diversigi sian instruadon.

## Juna Instruisto de la jaro

***La gajninto:***



**Paweł Fischer-Kotowski** (n. 1990) estas pola bibliotekisto kiu ekde 2022 vivas en Nederlando kaj laboras en la Reĝa Biblioteko en Hago. Esperantistiĝinte en 2005, li studis interlingvistikon en Poznano (2009–2013) kaj trapasis KER-ekzamenojn ĝis inkluzive la C2-nivelo.

ILEI/UEA-ekzamenanto ekde 2012 kaj membro de la KER-Ekzamena Centro ekde 2025. Li estas tre aktiva instruisto kun pli ol 400 sesioj en la programo „Ekparolu!" kaj gvidas kursojn en diversaj retaj kaj ĉeestaj aranĝoj, inkluzive de la nederlanda kaj belga studsemajnfinoj kaj staĝoj en la franca kastelo Grésillon. Krom instruado, li aktivas en la Esperanto-movado kiel redaktoro de pluraj revuoj (*La Ondo de Esperanto, Kontakto, Fenikso*), estis ĝenerala sekretario de TEJO (2012–

2014), komitatano A de UEA (2011–2016), kaj kunorganizis gravajn aranĝojn kiel la 72-an IJK en Vroclavo, montrante ampleksan kaj longdaŭran kontribuon al la Esperanto-komunumo.

***Honoraj atestiloj:***

*Joel* MUHIRE, 36-jara el DR Kongo, eklernis Esperanton en 2008 en Rutshuru, kie tiam estis preskaŭ neniu esperantisto; li piediris 10 km dimanĉe por lerni, poste pioniris instruadon en sia urbeto Kiwanja, kie li fondis klubon, disvastigis Esperanton per kvar lokaj radiostacioj kaj enkondukis ĝin en orfan lernejon. Li kreis klubojn ankaŭ en Bunagana (ĉe la landlimo kun Ugando) kaj en Shanje (Suda Kivuo). Krom instruado ĉeeste kaj rete, li aktivas kiel muzikisto, ILEI-sekciestro en DR Kongo, eks-sekretario de la Afrika Komisiono de UEA, aŭtoro de lernolibro en la svahila kaj redaktoro de la revuo Konga Stelo. En 2021 lia klubo Rondo Esperantista de Kiwanja, kunlabore kun la kina grupo Ciné Club la Patience, realigis la filmon Kvazaŭ korpo sen koro, kiu spekteblas en Jutubo. La daŭra milito en la orienta Kongo malhelpas lian agadon, tamen li persiste kontribuas al la movado malgraŭ la malfacilaj kondiĉoj.

*Ranja* ZAFINIFOTSY, 28-jara direktorino de granda lernejo en Antananarivo, Malagasio, estas tre aktiva junulino en la instruado kaj disvastigado de Esperanto. Ŝi mem eklernis la lingvon en 2018 kaj poste instruis ĝin al multaj lernantoj, el kiuj almenaŭ kvin fariĝis instruistoj kaj prelegantoj en la Malagasa E-Seminario de februaro 2025, kiun ŝi ankaŭ organizis. Ĉirkaŭ 32 el 42 partoprenantoj en tiu aranĝo lernis Esperanton rekte aŭ nerekte de ŝi. Ranja verkis infanlibron Semoj de amikecoj, kaj ŝia laboro jam ricevis internacian atenton. Ŝi estas bone ligita kun la Esperanto-komunumo kaj inspiras daŭran agadon inter junaj malagasoj.

*Alekso* MILLER, 35-jara usonano el Atlanta (Georgio), bakalaŭriĝis pri teatro kaj magistriĝis pri instruado de la angla ĉe la Universitato Liberty. Li eklernis Esperanton en 2013, trapasis la KER-ekzamenon je la nivelo C1 en 2019, kaj instruis ĉe la Aŭstralia Somera Kursaro en 2022. Kiel edukisto, li verkis kvin dulingvajn porinfanajn librojn kun gramatikaj gvidiloj, eldonitajn de Amazon, kaj produktis pli ol 200 edukajn filmetojn por sia Jutuba kanalo Exploring Esperanto, inkluzive de lecionoj, monologoj, kaj vlogoj. Liaj libroj kaj filmoj estas ofte uzataj kiel lernomaterialo, inkluzive en UEA.facila. Li ankaŭ aktivas kiel spertulo en la Fejsbuka grupo Esperanto Learners kaj li fondis la Usonan Bonan Film-Festivalon, kiu jam produktas pli ol 175 filmojn en Esperanto.